

informilo por interlingvistoj

ipi

27-a jaro (tria serio) | n-ro 105 (3/2018) | ISSN 1385-2191

Published by the Center for Research and Documentation on Word Language Problems (CED) and the Esperantic Studies Foundation (ESF)

Enhavo

1. Antaŭparolo	1
2. Lastatempaj publikigaĵoj	2
Libroj	2
Artikoloj.....	4
Artikoloj de Wim Jansen (University of Amsterdam, Lingvistiko, Profesoro Emerita)	4
Enhavo: Esperantologio / Esperanto Studies. Numero 8 (2018)	5
Aliaj	5
3. Simpozio pri multlingvismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj	5
4. Translingvado (Translanguaging) ĉe individuo, lernejo kaj socio	6
5. Re prezentado de “Nova Tutmondiĝo”: invito kontribui	7
6. Esperantoplena somero!.....	7
7. Lingvaj Rajtoj de Minoritatlingvanoj: Praktikaj Gvidilo por Efektivigo.....	7
8. Prelego Buchanan 2018 – Universitato de Liverpolo.....	8
9. Federico Gobbo (Amsterdamo/Torino): Prelegoj dum Usona-Kanada Landa Kongreso (Seatlo, julio 2018)	8
10. Novaĵoj ĉe ILEI	9
11. Internacia Kongresa Universitato kaj la scienca programo en Lisbono	9
12. Konferencoj.....	10

1. Antaŭparolo

Same kiel la antaŭaj numeroj, *Informilo por Interlingvistoj* kovras grandan diversecon de novaj eldonaĵoj, estontaj aranĝoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj informoj. Plejparte, ĝia enhavo similas al la enhavo de ĝia nova anglalingva eldono, *Information for Interlinguists*. Se vi ŝatus regule ricevi unu aŭ ambaŭ el tiuj ĉi eldonaĵoj kaj ne jam troviĝas en nia dissendolisto, sciigu nin (ipi@esperantic.org). Kiam aperos nova numero, ni informos vin pri tio, sendante al vi ligilon al la koncerna paĝo en la retejo de ESF (esperantic.org).

Nepre sendu al ni viajn novaĵojn pri lastatempaj publikigaĵoj, konferencoj, estonta aranĝoj ktp.!

Humphrey Tonkin

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

2. Lastatempaj publikigaĵoj

Libroj

Language Planning in the Post-Communist Era: The Struggles for Language Control in the New Order in Eastern Europe, Eurasia and China. Andrews, Ernest (ed.). London: Palgrave Macmillan, 2018. 316 p. eBook ISBN: 978-3-319-70926-0. Hardcover ISBN: 978-3-319-70925-3. DOI: 10.1007/978-3-319-70926-0. <https://www.palgrave.com/gp/book/9783319709253>

Profunda analizo pri la provoj de lingvofakuloj kaj registaroj kontroli la uzon kaj evoluon de la lingvo en Orienta Eŭropo, Eŭrazio kaj Ĉinio per planaktivecoj, ĝenerale konataj kiel lingvoplanado kaj lingvopolitiko. La dek prezentitaj studoj ekzamenas la lingvoplanadon en Ĉinio, Rusio, Tatario, Centra Azio, Ukrainio, Litovio, Latvio, Slovakio kaj Ĉeĥio. La studoj fokusiĝas pri okazaĵoj kaj disputoj, kiuj okazis post la “kolapso de komunismo” kaj je la apero de la nova ordo en la malfruaj 1980aj jaroj. La aŭtoroj substrekas la ĉefajn aferojn, kun kiuj lingvoplanado estas interplektita. Ili inkluzivas povpolitikon, tensiojn inter la “oficiala lingvo” kaj la “minoritataj lingvoj”, same kiel la politikan, socian, kulturalan kaj psikologian etoson de la lando.

New Speakers of Minority Languages: Linguistic Ideologies and Practices. Smith-Christmas, C., Ó Murchadha, N.P., Hornsby, M. & Moriarty, M. (eds.). London: Palgrave Macmillan, 2018. 295 p. eBook ISBN: 978-1-137-57558-6. Hardcover ISBN: 978-1-137-57557-9. DOI: 10.1057/978-1-137-57558-6. <https://www.palgrave.com/gp/book/9781137575579>

La libro reprezentas la unuan kolekton speciale dediĉitan al la Studoj pri Novaj Parolantoj (‘New Speaker Studies’), kun fokuso pri lingvaj ideologioj kaj lingvaj praktikoj en diversaj lingvokomunumoj. Tra pli ol trideko da ĉapitroj la aŭtoro uzas la lensojn de novaj parolantoj por ekzameni ne nur lingvajn demandojn (lingvovarieco kaj ŝanĝiĝo, fonetiko, ktp.), sed ankaŭ socilingvistikajn aferojn, kiel legitimeco, integriĝo kaj la motivoj pri lingvolernado kaj lingvouzo. Krom la pritrakto de la vasta gamo de lingvoj – la baska, bretona, gaela, galega, irlanda, skotgaela, kimra, ktp., kaj de diversaj socilingvistikaj situacioj, la libro prilumas la serion el diversaj kunteksto: institucioj, amaskomunikiloj, hejmo, kaj ankaŭ la manieroj, per kiuj oni fariĝas novaj parolantoj de minoritataj lingvoj, kiel enmigrado aŭ eduko. La libro, verkita de pluraj esploristoj, estos interesa por postdoktoraj studentoj, esploristoj, universitatoj kaj ĉiuj kiuj laboras en la kampoj de socilingvistiko, aplikata lingvistiko, lingvopolitiko, same kiel por tiuj, kies laboro tuŝas minoritatajn komunumojn.

Languages after Brexit: How the UK Speaks to the World. Kelly, Michael (ed.). London: Palgrave Macmillan, 2018. 271 p. eBook ISBN: 978-3-319-65169-9. DOI: 10.1007/978-3-319-65169-9. Softcover ISBN: 978-3-319-65168-2. <https://www.palgrave.com/gb/book/9783319651682>

La libro estas signifa kontribuo al la debatoj ĉirkaŭ Briteliro kaj la lingvopolitiko. Ĝi analizas lingvokapablojn kaj rimedojn en Britio en la nova, postreferenduma klimato, en kiu al la ĝenerala malamo al fremdaj lingvoj aldoniĝas la neceso renegoci kaj krei la rilatojn kun la cetero de Eŭropo kaj preter ĝi. La aŭtoroj pridemandas la bezonojn de kernaj rimedoj en diversaj kampoj de la socio, inkluzive de politiko, ekonomio, komerco, scienco kaj eduko, samtempe donante praktikajn konsilojn kaj gvidadon pri tio, kiel transvivi en la nova internacia medio. Tiu ĉi ekstrema ĝustatempe eldonita kolekto kunigas ĉefajn mondajn esploristojn en la kampoj de lingvopolitiko, kaj certe estos interesa ne nur al studentoj kaj fakuloj, sed ankaŭ al homoj, kiuj laboras en la kampo, al registaraj dungitoj kaj edukistoj.

Gender and Translation: Understanding Agents in Transnational Reception. Isis Herrero López, Cecilia Alvstad, Johanna Akujärvi and Synnøve Skarsbø Lindtner (eds.). Montreal: Éditions québécoises de l'oeuvre, collection Vita Traductiva, 2018. Print Version: ISBN 978-2-924337-13-4; ISSN 1927-7792; v. 10. Electronic Version: ISBN 978-2-924337-14-1; ISSN 1927-7806; v. 10.

<https://www.jiaotongbakercentre.org/2018/03/22/new-publication-gender-and-translation-understanding-agents-in-transnational-reception/>

Tiu ĉi nova esploro en la kampo de tradukado substrekas la fundamentan rolon, kiun ludas la genro en traduko kaj transnacia percepto. Tiu ĉi volumo aldonas freŝajn sciojn al tiu ĉi riĉa kampo per la ekzameno de la demando, kiel genro konkrete influas la personojn, kiuj partoprenas en selektado, traduko, redaktado, antaŭenigo kaj reviziado de specifaj tekstoj. La kontrubuantoj esploras kiel anglo-usonanoj aŭ francoj perceptas la svedajn verkistinojn (Flygare-Carlén, Bremer, Lagerlöf), Beauvoir en la norvega, Austen en la hispana, kaj la feminismon ĉe la norvega eldonisto Pax, svedajn kaj norvegajn tradukojn de helenaj kaj romiaj tekstoj, kaj la tradukojn, fare de belgo, de anglalingvaj militmemuaroj de flegistino. Per la plonĝo en tiuj ĉi multifacetaj temoj, ili montras, kiel genro povas interagi en kompleksaj, eĉ kontraŭdiraj manieroj kun la aŭtoreco, kopirajtaj leĝoj, ideologio, redakta politiko, cenzuro, kaj la publika kulturo.

Aliroj al Esperanto. 15 div. aŭtoroj. Ĉefred. Christer Oscar Kiselman. Eseoj. KAVA-PECH. Dobřichovice. 2018. 229 paĝoj. Prezo: 16.20 EUR. Kiom da aŭtoroj, tiom da aliroj al Esperanto. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9588>.

Pado al paradizo: Clarence Bicknell kaj la Valo de la Mirindaĵoj. Christopher Chippindale, tradukita de Humphrey Tonkin. Milano: Itala Esperanto-Federacio. 2018. 78pp. Tiu ĉi mallonga biografio de Esperanto-pioniro kaj poeto Clarence Bicknell jam ekzistas en la angla, franca kaj itala lingvoj. Bicknell, kiu, aldone al sia Esperanto-agado, studis la floraron de nordokcidenta Italio kaj faris arkeologiajn registrojn en la nuna sudorienta Francio, estis inter la fondintoj de la Esperanto-movado en Italio, kie li loĝis preskaŭ kvardek jarojn. Li starigis bibliotekon kaj muzeon en Bordighera, ĉeestis la unuan Esperanto-kongreson en 1905 kaj estis ano de la Lingva Komitato.

Floroj de l' malbono, La, Charles Baudelaire, *Poezio tradukita*, Fonto, 2017 (2a eld.). Impona poezia rakonto pri la tragedio de malespera solulo. Prezo: 39.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=3438>

Tragedio de l' homo, La, Drama poemo. **Imre Madách,** *Teatraĵoj*, Fonto, 2017 (3a eld.). Ĉefverko de la hungara literaturo kaj de la Esperanta tradukita literaturo. Prezo: 30.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=6106>

Noveloj, Henryk Sienkiewicz, *Prozo tradukita*, Fonto, 2017 (3a eld.). Kvin noveloj de Nobel-premiito. Prezo: 8.10 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=3939>

Lanternisto, La, kaj aliaj verketoj. **Div,** *Prozo tradukita*, Fonto, 2017. 10 noveloj tradukitaj de Kabe. Prezo: 15.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=4485>

Al eterna paco, Immanuel Kant, *Filozofio*, Fonto, 2017 (2a eld.). Filozia traktaĵo origine publikigita en 1792, sed aktuala ghis hodiaŭ. Prezo: 9.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=6552>

Alaska stafeto, La, F. Omelka, *Prozo originala*, Fonto, 2017 (reeld.). Rakonto dediĉita al la eventoj de 1925, kiam epidemio de difterio mortigis amason da indiĝenoj en la Alaska urbeto Nome. Prezo: 12.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=9606>

Batalo de l' vivo, La, Charles Dickens, *Prozo tradukita*, Fonto, 2018 (5a eld.). Pionira E-traduko. Prezo: 12.90 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo:* <http://katalogo.uea.org?inf=2095>

Patroj kaj filoj, Ivan S. Turgenev, *Prozo tradukita*, Fonto, 2017 (3a eld.). Fama romano de klasika aŭtoro. Prezo: 27.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: <http://katalogo.uea.org?inf=3290>

Tagoj kaj ruinoj, Jaime Grau Casas, *Miksita literaturo*, SATeH, 2017. Diversaj tekstoj de ĉefa figuro de la kataluna Esperanto-movado en la unua duono de la pasinta jarcento. Prezo: 21.30 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: <http://katalogo.uea.org?inf=9604>

Beletra Almanako 31, (Februaro 2018). *Miksita literaturo*, Mondial, 2018. Prozo kaj poezio (originalaj kaj tradukitaj), artikoloj, eseoj, nekrologoj, recenzoj, intervjuo. Prezo: 9.90 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: <http://katalogo.uea.org?inf=9599>

Plansprachen Volapük und Esperanto in Konstanz, Die, Geschichte und lokale Ereignisse. **Hans-Dieter Kuhn**, *Movado*, Hartung-Gorre, 2010. Germanlingva historio de la volapuka kaj Esperanta movadoj en la sudgermana urbo. Prezo: 16.80 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo*: <http://katalogo.uea.org?inf=1575>

Esperantologio / Esperanto Studies, Kajero 8. *Eseoj*, KAVA-PECH, 2018. Speciala numero grandparte dediĉita al kelkaj gravuloj forpasintaj lastatempe: Michel Duc Goninaz, Detlev Blanke, Yamasaki Seikô, Paul Gubbins, Reinhard Haupenthal, Zbigniew Galor. Prezo: 9.60 EUR. Vidu la enhavon ĉi-sube. *Pliaj informoj, reta mendilo*: <http://katalogo.uea.org?inf=9593>

La infana raso / La specie bambina. William Auld. Trans. Nicolino Rossi. Bari, Italy: Edizioni Nemapress, 2017. 149pp. Paralela eldono (Esperanto, itala) de la gravega verko de Auld. La itala traduko estas farite de konata itala Esperanto-poeto N. Rossi.

Artikoloj

Park, J. S. Y. & Wee, L. Markets of English: Linguistic Capital and Language Policy in a Globalizing World. New York: Routledge, 212. 216 pp. (Book Review).
<https://www.tandfonline.com/doi/full/10.1080/15348458.2016.1233068>

Reinhard Haupenthal. 2018. Interlinguistik und Esperantologie. Zwei neue sprachwissenschaftliche Disziplinen. En: Sebastian Fink, Martin Lang & Manfred Schretter, red. *Mehrsprachigkeit: Von Alten Orient bis zum Esperanto*. Münster: Zaphon. 43-72.

Esperanto – not what you thought? British Library blog: <http://blogs.bl.uk/european/2018/04/esperanto-not-what-you-thought.html>

Humphrey Tonkin. 2018. Tivadar Soros kaj Julio Baghy – transvivantoj. *Beletra Almanako* 31, Feb. 2018. 69-85.

Brigid O’Keeffe. 2018. Enkonduko al *Antaŭ unu jarcento: La Granda Milito*. *Beletra Almanako* 31, Feb. 2018. 108-113.

Artikoloj de Wim Jansen (University of Amsterdam, Lingvistiko, Profesoro Emerita)

Wim Jansen, Emerita Profesoro, Universitato de Amsterdam, estis lastatempe nomumita membro de la "Societo pri Nederlanda Literaturo", prestiĝa kaj ekskluziva societo pri literaturo establita en Leiden en 1766. Multaj artikoloj prezentitaj tuŝas Esperanton kaj rilatajn temojn kaj estas listigitaj ĉe: <http://amsterdam.academia.edu/WimJansen>. Jen kelkaj el pluraj artikoloj:

- Word migration from Dutch to Basque
- Derivation in the lexicon: The case of Esperanto
- Pri supozata kaŝita regulo en la gramatiko de Esperanto
- Esperanto parts of speech in functional discourse grammar
- The learnability of the reflexive in Esperanto

Enhavo: Esperantologio / Esperanto Studies. Numero 8 (2018)

Christer Kiselman: Salvavorto de la redaktoro	3
Christer Kiselman: A word from the editor	8
Paul Gubbins: Grava verko pri la esperanta literaturo.	
Recenzo de la libro de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, Historio de la esperanta literaturo	13
Klaus Schubert: Esperanto als komplexes System.	
Rezension von The Phenomenon of Esperanto	17
Leif Nordenstorm: Recenzo pri nova eldono de studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, verkita de Ulrich Lins	23
Ilona Koutny & Zbigniew Galor: Michel Duc Goninaz – esperantologo reviziata naivecon de la esperantista racio	31
Claude Roux: Michel Duc Goninaz kaj la reviziado de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto	37
Jacques Le Puil: Michel Duc Goninaz, lingvisto kaj akordionisto	42
Sabine Fiedler & Cyril Brosch: Detlev Blanke (1941–2016): Tuta vivo por interlingvistiko	43
Pri la revuo Esperantologio / Esperanto Studies 1999–2018	46
Michael D. Gordin: On Detlev Blanke: Beyond Esperanto	47
Haitao Liu: Detlev Blanke: mia interlingvistika patro	51
Probal Dasgupta: Paul Gubbins (1949–2016)	55
Carlo Minnaja: Memoro pri Reinhard Haupenthal (1945–2016)	57
Jukka Pietiläinen: Zbigniew Galor – esperantista sociologo (1952–2017)	69
<i>La paperan version publikigas KAVA-PECH, Dobrichovice. La elektronikan version publikigas Upsala universitato</i>	

Aliaj

- Intervjuo kun Humphrey Tonkin pri George Soros ĉe BBC4:
<https://www.bbc.co.uk/programmes/b0b5qgsr>
- Robin Hill (Novjorko) kompilis liston de senpagaj retaj esperantaj tekstofontoj:
https://docs.google.com/document/d/1ZObSjawQOq6PAEjLSRQuXRw775dPsgDjHxsYoqXZ_dk/edit
- YouTube-kanalo kun konferencoj kaj prelegoj de Summer School on Linguistic Policy, Linguistic Planning and Evaluation (LPLPE17) – Somerlernejo pri Lingvopolitiko, Lingvistika Planado kaj Pritakso: <https://www.youtube.com/channel/UCZ1gZRRoYvwHQDdLNT1uqUA>

3. Simpozio pri multlingvismo ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Kion oni povas fari por antaŭenigi multlingvismon en la laboro de Unuiĝintaj Nacioj? Kiel tio farus UN-on pli efika? Jen demandoj levitaj en lastatempa simpozio pri multlingvismo organizita de la Studogrupo pri Lingvoj kaj UN. Partoprenantoj interkonsentis, ke la lingvaj bezonoj de UN etendiĝas preter la tradukado

kaj interpretado de ĝiaj ses oficialaj lingvoj, sed ke tiuj pliaj bezonoj ne ricevas sufiĉan atenton. Nek plene realiĝas la tuta lingva potencialo de UN.

En larĝa diskutado, UN-personaro, diplomatoj, neregistaraj organizaĵoj kaj universitatoj ĝenerale samopiniis, ke, por plene realigi sian celon de engaĝado de civila socio, kaj por eniri konstruan dialogon kun siaj diversaj publikoj, UN devas alfronti siajn eksterajn lingvajn prioritatojn kaj trovi la rimedojn por ilin plenumi. Simpoziaj partoprenantoj menciis packonservajn operaciojn, informservojn de UN, kaj, ĉefe, realigon de la Celoj por Daŭripova Evoluigo kiel terenojn kie necesas pli sistema agado por utiligi vastan gamon de lingvoj se oni vere deziras atingi sukceson.

La simpozio, okazinta en 777 UN Plaza, tuj apud la UN-ĉefsidejo, la 10-an kaj 11-an de majo 2018 malfermiĝis per podia diskuto inter kvar ambasadoroj: Martín García Moritán el Argentino, Rudolph Michael Ten-Pow el Gujano, Valentin Rybakov el Belorusio, kaj Narjess Saidane de la Internacia Organizaĵo de la Francparolanta Komunumo. Prezidis Igor Shpiniov de la Fakoj pri Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj Konferencoj. Ĝisence reprezentante kvar el la ses oficialajn lingvojn (hispanan, anglan, rusan, francan), la kvar podianoj traktis klopodojn atingi egalecon inter la ses lingvoj, emfazante la mankon de rimedoj kaj la kreskantajn postulojn pri lingvaj servoj. Ĉefparolanto en la simpozio estis Michele Gazzola, de la Universitato de Leipzig, fakulo pri lingva ekonomiko, kiu traktis lingvopolitikon en la Monda Organizaĵo pri Intelekta Proprieto kaj la Eŭropa Patenta Oficejo. Pli multlingva aliro al patentado helpus protekti intelektan proprietaĵon, li argumentis, kaj tiel la homaron. Ĝi havas sencon el ekonomia sed ankaŭ humana vidpunkto.

La simpozion sponsoris la Centro por Aplika Lingvistiko (Vaŝingtono), Birkbeck (Universitato de Londono), la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj ties revuo Language Problems & Language Planning, Universala Esperanto-Asocio, kaj Esperantic Studies Foundation. Pliaj informoj haveblas ĉe www.languageandtheun.org.

4. Translingvado (Translanguaging) ĉe individuo, lernejo kaj socio

La tria Sveda Konferenco pri Translingvado (*Translanguaging*), TL2019, okazos en Linnæus University, Växjö, Svedio, la 11-12-de aprilo 2019.

La konferenco kunvenigos esploristojn pri translingvado en lokaj kaj en internacia kuntekstoj. Ene de la ĝenerala temo de migrado kaj tutmondiĝo, la konferenco fokusiĝos sur lingva diverseco en lernejoj kaj en la socio, evoluo de multlingva alfabetismo kaj lernado per la uzo de multlingvaj repertuaroj.

La temo de la konferenco, translingvado ĉe individuo, lernejo kaj socio, invitas homojn, kiuj faras esplorojn pri translingvado ĉe individuoj, en diversaj edukaj kuntekstoj kaj en la socio pli larĝe. La konferenco bonvenigas esploristojn, postdoktorajn studentojn, edukistojn, instruistojn kaj ĉiujn kun intereso pri multlingvismo en diversaj kuntekstoj.

Ĉefprelegantoj: Jim Cummins, Nancy H. Hornberger, Francis M. Hult, Anne Pitkänen-Huhta, Gudrun Svensson.

Invito kontribui: ni bonvenigas sugestojn por grupsesioj kaj individuaj referaĵoj. Bv. submeti aŭ grupsesian proponon (600-900 vortojn), aŭ 300-vortan resumon de individuaj prezentaĵoj, ĝis la 15-a de septembro

2018. La grupsesiaj proponoj devas enhavi mallongan priskribon de la fokuso de la sesio kaj 3-4 resumojn de kontribuaĵoj, kiuj enestos. La individuaj resumoj estos aldonitaj al la sesio post la pritakso. Pli da informoj: <https://lnu.se/en/research/conferences/3rd-translanguaging-conference/>

5. Mapado de la “Nova Tutmondiĝo”: Invito kontribui

Ni ĝojas anonci la inviton kontribui referaĵojn por la Dekdua Konferenco pri Tutmondaj Studoj, kiu okazos la 27-28-an de junio 2019 en Jagiellonian University en Kraków, Pollando. Ni invitas proponojn por prezenti individuajn referaĵojn, atelierojn/interagajn sesiojn, afiŝojn/ekspoziciojn, kolokvojn, virtualajn afiŝojn aŭ virtualajn fulmprelegojn. La konferenco emfazos esplorojn kiuj pritraktos la jarajn temojn kaj la specialan fokuson por 2019: “La ‘Fino de Historio’ 30 jarojn poste: Tutmondiĝo tiam kaj nun”. (Notu, ke la konferenco de 2018 okazos la 30-an kaj 31-an de julio en Granda, Hispanio, kun speciala fokuso “La Subjektivecoj de Tutmondismo”). Pliaj informoj: <http://onglobalization.com/>

6. Esperantoplena somero!

Multaj Esperanto-rilataj aferoj okazas ĉi-somere! Jen bona okazo partopreni, renkonti simil-pensantajn homojn kaj lerni pri novaĵoj ĉe ESF kaj la kampo de interlingvistiko, Esperanto-edukado kaj esplorado! Multaj eventoj estas organizataj, sponsorataj aŭ okazas kun partopreno de ESF. Vi ankaŭ havos la okazon renkonti la ESF-prezidanton, Humphrey Tonkin, kaj la estraron de ESF dum la Usona-Kanada Landa kongreso en Seatlo kaj dum la UK en Lisbono, en tiu ĉi speciala jaro, kiam ESF festas sian 50-jariĝon!

- Usona-Kanada Landa Kongreso (13-16an de julio, Seatlo, Usono). Temo: "Konstruado kaj ĝuado de Esperanta komunumo". Retejo: <https://landakongreso.org/>

- NASK: La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (3-12an de julio, Raleigh, Usono). Instruistoj: Anna Lowenstein, Katalin Kováts, José Antonio Vergara, Thomas Alexander. Gast-preleganto: Renato Corsetti. Retejo: <http://nask.esperanto-usa.org/venonta/>

- 103-a Universala Kongreso de Esperanto (28an de julio - 4an de aŭgusto, Lisbono, Portugalio). Temo: "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?" Retejo: <https://uea.org/kongresoj/UK/2018>.

- Esperantologia Konferenco 2018 (2an de aŭgusto, Lisbono, Portugalio), kadre de la UK, sub la aŭspicio de UEA kaj CED, omaĝe al la vivo kaj verko de Detlev Blanke. Retejo: <http://ek2018.kulturo.net/>

- Nitobe-simpozio (4-5an de aŭgusto, Lisbono, Portugalio), tuj post la UK. Temo: Esperanto kaj universitato. Retejo: <http://www.esperantic.org/eo/2018/05/07/nitobe-lisbono/>

7. Lingvaj Rajtoj de Minoritatlingvanoj: Praktika gvidilo por efektivigo

La Oficejo de Alta Komisionestro de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj aperigis gvidilon pri Lingvaj Rajtoj de Minoritatlingvanoj (marto 2017). Ĝi celas servi kiel praktika ilo por helpi registarajn funkciulojn kaj koncernajn personojn havi pli bonan komprenon de lingvaj rajtoj kaj doni rekomendojn, kiuj povus esti uzataj en diversaj kunteksto. Ĝi celas helpi en la strebo atingi necesan ekvilibron inter la ŝtata(j) oficiala(j) lingvo(j) kaj la devoj de la ŝtato rilate al lingvaj preferoj de minoritatlingvanoj. Protekto kaj antaŭenigo de la lingvaj rajtoj ankaŭ helpas konservi la mondan lingvan diversecon. La gvidilo, interalie, celas klarigi diversajn rajtojn de minoritatlingvanoj rilate al la lingva uzo kaj preferoj, klarigi la devojn de ŝtataj

aŭtoritatoj rilate al minoritatlingvanoj, kaj antaŭenigi konsekvencajn aliron al la partopreno kaj inkludo de minoritatoj en la publika vivo kaj la efektiviĝo de lingvaj rajtoj de minoritatlingvanoj.

Pli da informoj: <http://www.ohchr.org/EN/Issues/Minorities/SRMinorities/Pages/LanguageRights.aspx>

8. Prelego Buchanan 2018 – Universitato de Liverpolo

9a de majo 2018: Prelego Buchanan 2018 – Universitato de Liverpolo, Britio

La ĉi-jaran prelegon prezentis Javier Alcalde antaŭ 20-kelk-kapa aŭskultantaro, kiun konsistigis instruistaj kaj studentaj membroj de la Liverpola universitato, ĉu el fakultato lingva, ĉu el historia, scivolemuloj kaj interesitaj esperantistoj.

S-ro Alcalde lerte sukcesis klarigi al nefakuloj la fonon de la hispana interna milito kaj ĝiajn ĥaosan evoluon kaj postsekvojn. Uzante plurajn ilustraĵojn – historiajn fotojn pri la eventoj, portretoj de koncernaj personoj, tiamajn afiŝojn kaj eltiraĵojn el tiutempaj hispan- aŭ esperant-lingvaj revuoj kaj gazetoj – li kaptis kaj tenis la atenton de la publiko, dum li rivelis la hodiaŭ apenaŭ imageble fortan disvastiĝon de Esperanto tra diversaj tavoloj de la socio, sed kun aparta emfazo pri ĝia liga funkcio inter politikaj kaj sociaj grupigoj en- kaj ekster-landaj.

Evidente s-ro Alcalde jam entreprenis profundajn esplorojn, konsultante ne nur historiajn dokumentojn, sed ankaŭ homojn, kiuj mem travivis la pritraktatajn eventojn, aŭ ties parencojn. Lian prelegon spicis mencioj de iom famaj hispanoj el tiu periodo, kiuj faris grandajn sociajn atingojn en diversaj kampoj, ekzemple politiko, sporto aŭ medicino, kaj montriĝis, ke ankaŭ tiuj estis esperantistoj. Esperantisteco en si mem tamen ne garantiis malaperon de konfliktoj el la socio, nek el la raportado pri la eventoj: la ‘transnacia lingvo’, kvankam teorie provo superi partiececajn celojn, estis foje aplikata same kiel iu ajn lingvo por ilin atingi. Finfine Esperanto povas esti rigardata kiel nura ‘ilo’ diversmaniere utiligebla.

Resumo: http://www.esperantoresearch.org.uk/sites/default/files/site/files/javier_alcalde_9.5.2018.pdf

9. Federico Gobbo (Amsterdamo/Torino): Prelegoj dum la venonta usona-kanada landa Esperanto-kongreso (Seatlo, julio 2018)

Interlingvistiko en la 21a jarcento: novaj ŝancoj, novaj defioj

La vorton ‘interlingvistiko’ inventis la belga esperantisto kaj stenografisto Jules Meysmans en 1911, sed nur en 1931 ĝi populariĝis inter lingvistoj, post prelego de Otto Jespersen, la fama dana lingvisto. Kio okazis al la fako ekde tiam? Ĉu la origina difino de Jespersen ankoraŭ aktualas? Se ne, kial? La prelego ofertas superrigardon pri la temo, unue klarigante la ĉefajn historiajn periodojn de interlingvistiko: unue, la pionira epoko (1879 – 1911), kiam oni ĵetis ties bazojn; due, la fonda epoko (1911 – 1951), kiam okazis la interlingvistikaj militoj por decidi la plej ‘taŭgan’ formon de helplingvo; trie, la skola epoko (1951 – 1990), kiam sendependaj interlingvistikaj skoloj formiĝis en diversaj landoj, ĉefe Germanio, Hungario, Italio Nederlando, Pollando, ĉiuj kun aparta atento al Esperanto; fine, la nuntempa lingvopolitika epoko (1990 – nun), ekde kiam interlingvistiko pli firme dialogas kun aliaj fakoj, ĉefe lingvistiko kaj diversspecaj sociaj kaj politikaj sciencoj, aparte per la temoj tutmondiĝo, lingva justeco, mastrumado de multlingvismo, novaj formoj de movebleco. Multon oni esploris en la pasinta jarcento, sed ankoraŭ pli da laboro atendas la esploriston en la 21a jarcento. La prelego prezentos esplor-programon kiun indas plenumi por montri kiel interlingvistiko kapablas kontribui, al la fakuloj kaj al la ĝenerala socio samtempe.

Kiel transformiĝas la Esperanta komunumo: nuntempaj tendencoj

Laŭ la oksforda filozofo Luciano Floridi, ni travivas nur la kvaran revolucion de la homaro, ankaŭ nomata bitrevolucio. Post la perdo de la centro de la universo (unua revolucio, per Koperniko), la perdo de la centro de la naturo (dua revolucio, per Darwin) kaj la perdo de la centro de la homa racio (tria revolucio, per Freud), en la pasinta jarcento la homaro perdis la centron de la agenteco (kvara revolucio, per Turing). Alivorte, nuntempaj homoj ne plu konsidereblas nekonektitaj agentoj kiuj agas en la medio kaj modifas ĝin individue, sed kompleksaj inform(ig)aj agentoj, kiuj konstante rilatas ne nur al naturaj agentoj (animaloj kaj plantoj) sed ankaŭ – kaj ĉefe – al la artefaritaj, faritaj el bitoj. Tiuj inform(ig)aj agentoj finfine ŝangas en la profundo kaj la naturon kaj la vivmedion. Malgraŭ tio, ke Esperanto estas tipa produkto de la dua revolucio – kiam la homaro ankoraŭ fidis je la saviga povo de la racio – ĝia pluekzisto pruvas, ke la Esperanta komunumo sukcese adaptiĝis al la ŝanĝoj de la tempoj, kaj aparte al la ekesto de la aliaj du revolucioj. La prelego intencas oferti analizon pri la nuntempa situacio de la Esperanta komunumo kaj la neceso kaj oportuno adaptiĝi al la nuntempa realo, kiu estas farata de tiuj kompleksaj agentoj vivantaj en informmedio, kaj instigi al pripensado de la rolo de Esperanto kaj aparte de ĝia komunumo en la nuntempo.

10. Novaĵoj ĉe ILEI

- Raporto pri trimonada periodo:
http://www.ilei.info/agado/2018-04-15_Raporto%20pri%20trimonata%20periodo.pdf
- Enhavo de IPR (Internacia Pedagogia Revuo):
<http://www.ilei.info/novajxoj/enhavoIPR182.php>
- La ILEI simpozio (26-27-a de julio, Madrido, Hispanio) okazos dum la 51a ILEI-kongreso, 20-28-a de julio 2018, kiu parte koincidas kun la 77a Hispana Kongreso de Esperanto (20-22-a de julio). La temo de la ambaŭ kongresoj estas “La kultura heredaĵo de Esperanto”. ILEI-Simpozio (26-27a de julio 2018, Madrido, Hispanio). Aparte abundos kleriga kaj kultura programo (Esperantista trejnado, AMO-seminario, kursoj, teatro, libroprezentoj).
<http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/357>
- La 52-a ILEI-Kongreso okazos en Ĉaĉak (Serbio), 13-20-an de julio 2019, kun la proponata temo “Lernado en virtualaj komunumoj”. ILEI esperas kaj klopodos, ke la Kongreso en balkana lando kontribuu al revigligo de la movado en Sud-Orienta Eŭropo.
- La Premio Maŭro La Torre: aljuĝita al Alessandra MADELLA (Italio / Ĉinio). Ŝi verkis eseon pri la instruado de Esperanto ĉe la Artkolegio de Kunming kiel etos-konstruado. (La familio de Profesoro Maŭro La Torre, kiu estis prezidanto de ILEI, decidis lanĉi tiun Premion en 2014, memore al Profesoro La Torre kaj fokusante ĝin al liaj studfakoj. La regularo estis kreita kunlabore kun ILEI, kaj la unua Premio estis aljuĝita al D-ro Davide ASTORI en 2015. En 2018 kadre de la Tago de Lernado dum UK en Lisbono la Premio duan fojon estos transdonita fare de reprezentanto de la familio La Torre kaj de ILEI.)

11. Internacia Kongresa Universitato kaj la scienca programo en Lisbono

Laŭ rekomendo de la IKU-komisiono, la Estraro de UEA decidis pri la prelegoj de la ĉi-jara sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). El 25 ricevitaj proponoj, kadre de la IKU okazos naŭ prelegoj, el kiuj tri havos daŭrigajn prelegojn kaj servos ankaŭ kiel kursoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS): Landoj ĉe vojkruciĝo (Butan), La deziro konkeri la ĉielon: de Leonardo al flugrobotoj (Maurelli kaj Zhang), kaj Modernaj serĉistemoj kaj sociaj retoj: ĉu la vojo al tutmondiĝo? (Ŝevĉenko).

La aliaj ses IKU-prelegoj traktos plej diversajn temojn kiel Tutmondiĝo de portugalaj kulturo kaj lingvo: Kien nun, kreoloj? (Barandovská), Perspektivoj por la Eŭropa Unio (Brandenburg), Eŭropa demografia kaj ekonomika dinamiko: migrantoj necesas! (Martins), Kiel la verbo doni rilatas al universala homa ago?

(Planchon), La biologiaj bazoj de la mensogo (Pontes) kaj Sukcesoj kaj perspektivoj en planedo-scienco (Rossi).

Dek pliaj pli mallongaj prelegoj okazos kadre de la Scienca Kafejo (SK), en du blokoj de po 5 prelegoj kiel en Lillo. Tie la kongresanoj havos la ŝancon kleriĝi pri ankoraŭ pli diversaj temoj, i.a. La forpasinta jida lingvo kaj ties forpasinta bardo (Bronŝtejn), Popolmigrado kaj la Eŭropa dilemo (Markus), Célestin Freinet, pedagogo kaj esperantisto (Molnár), Cirkulado de hidrargo en la naturo (Raola), La angla: ĉu kreola lingvo de konkeritoj? (Stria), Ĉu heroo malvenkas? (Striganova), kaj La havaĵo pri UEA en la la Aŭstria Nacia Biblioteko (Tuidler).

La resumoj de ĉiuj IKU- kaj SK-prelegoj estas legeblaj ĉe: <https://uea.org/teko/iku/2018>. Kiel kutime aperos la IKU-Libro kun la tekstoj de la IKU-prelegoj kaj resumoj de la Scienca Kafejo. Ĝi estos aĉetebla en la Libroservo, ĉe la prelegoj kaj eĉ dum la Movada Foiro, ĉe la IKU-tablo.

La partoprenantoj de la IKU-AIS-kursoj povos ekzameniĝi kaj ricevi AIS-atestojn, kiuj estos disdonitaj publike dum la Scienca Forumo, publika prezentaĵo de la scienca agado en Esperantujo, komuna al IKU, AIS, Internacia Scienca Asocio Intenacia (ISAE) kaj pliaj sciencaj aranĝoj. En la Scienca Forumo, jam konata de Nitra kaj Seulo, estos prezentitaj la agadoj de AIS kaj ISAE, la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (<http://kaest2018.ikso.net/>) okazonta en oktobro, la Premio Pirlot por la plej bonaj sciencaj verkoj, kaj la 35-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS okazonta en aŭgusto dum la Itala Kongreso en Sanmarino (vidu SUS35 kaj Pirlot2018, respektive, en <http://www.ais-sanmarino.org/>).

12. Konferencoj

Oktobro 2018, Londono (Britio), University of Westminster. WITTA-konferenco: La estonteco de la edukado pri interpretado kaj tradukado. <http://www.witta.org/cn/>

Novembro 2018, Prago (Ĉeĥio), Praga Universitato. Doktornivela ateliero Pathways in Translation Studies (Aliroj en Tradukaj Studoj). <https://cestyworkshop.ff.cuni.cz/en/>

Eldonas Ipl: Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Humphrey Tonkin kaj Yevgeniya (Ĵenja) Amis, kun helpo de Raúl J. García. Redakcio (kontribuoj, ricevado de la bulteno, k.s.): ipi@esperantic.org. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj.